

NIKOLAO HOHLOV

# LA MORTO DE LA DELEGITO DE U.E.A.

ORIGINALA KOMEDIO EL LA  
VIVO DE ESPERANTISTOJ


Eldono de "Sudslava Esperanto-Servo"

1924

Presejo: C. Albrecht, Zagreb, Jugoslavio

Reaperinta en Projekto Kelter  
Kultura Centro de Esperanto-Campinas, Brazilo (Oktobro, 2000)

<http://www.esperanto.cc>



*Rimarko [1924]: Tiu ĉi komedio estos prezentata ĉe la  
XVI-a Universala Esperanto-Kongreso en Wien de societanoj de  
Zagreba Esperanto-Societo*

## Enkonduko



En "Enciklopedio de Esperanto" (1933), oni legas, ke Nikolao Hohlov estis ruso, supera ekonomikisto ĉe industria trusto. Li naskiĝis en Moskvo, en 1891, kaj esperantistiĝis tre juna, en 1905. Li kontribuis al pluraj gazetoj, inkluzive per tradukoj el aliaj lingvoj. Tiu ĉi verketo estis lia unua publikigita libro, kiun sekvis multaj aliaj, i. a. la fama traduko de "Historio de la Mondolingvo" de Drezen (1928). W. B. Johnson skribas en la "Enciklopedio", ke *Unua Suno* de Hohlov estis tiutempe unu el la plej belaj poemoj en nia lingvo: *"Kombino de sentimento kaj realismo efikas virece en liaj ampoemoj: en pasia amanto li vidas la kaŝitan*

*'odaliskon', dum amanta virino estas mikso el tigro kaj mimoz'. Tamen ŝajnas nun, ke la sociala konscienco en Hohlov venkis lian lirikismon. Lia funde serioza menso sin turnis al pli urĝaj laboroj por la lingvaj instancoj de S.E.U. [soveta e-unuiĝo] kaj al tradukado de klasbatalaj poemoj."*

Hohlov mortis en 1953.

**Projekto Kelter Kultura Centro de Esperanto  
Campinas-Brazilo, oktobro 2000**

## LA MORTO DE LA DELEGITO DE U.E.A.

### Agantaj personoj

Aleksandro Koaks, inĝeniero, Delegito de U.E.A.

Helena, lia edzino

Filipo, ilia servisto

Agneso, ilia servistino

Ferdinando Bemol, muzikisto de la loka opero, Subdelegito de U.E.A.

Adamo Rabat, komercisto, Prezidanto de la loka Esper. Societo

Ernesto Ranunkol, studento, sekretario de la Societo

Willy Hju-ám-ám, negro el Liberio, vojaĝanta esperantisto

Ĉerkisto

Portistoj.

## Parto I

### Sceno 1-a.

*La scenejo prezentas kabineton de l'ingénieur. Frua mateno. Servisto Filipino dormas en la apogseĝo. Tio daŭras du minutojn.*

**Filipo:** *(vekiĝante iom post iom)* F-f-fu! Ee-ee-eh! *(oscedas, rigardas mirante ĉirkaŭen, poste elpoŝigas la horloĝon).* Stranga afero! Estas jam la sepa kaj duono matene kaj mia mastro ankoraŭ ne revenis hejmen! Tio neniam okazis antaŭe *(Promenas)*. Vere, li ĉiam venas tre malfrue, kiam estas la kunsidoj en la komitato de nia Esperanta societo, sed ke li forestu la tutan nokton!... tio neniam, neniam ankoraŭ estis okazinta. *(Paŭzeto. Komencas ordigi la meblon).* Mi atendis lin la tutan nokton sed fine la dormo venkis min kaj mi falis en la apogseĝon.

Mi ne scias, kion diros la sinjorino, kiam ŝi rimarkos la foreston de l'edzo... *(Pripensas)*. Tamen mi devus diri al ŝi la veron, se ŝi min okaze demandas. Kontraŭe, mi diros ke la mastro devis tre frue leviĝi por iu urĝa afero kaj ke li komisiis min sciigi la sinjorinon pri la kialo, por ne malkvietigi ŝin senbezone.

Povas esti, ke mia mastro estas kulpa, aŭ ke li komencis fari tiujn... karambolojn... ekster la hejmo, tamen mia devo certe estas llin defendi kaj savi. Dio mia, Dio mia, kio do tamen okazis? Mi estas tiel malkvieta, ĉar... ĉar kial kaŝi la sekreton... mi tre respektas kaj amas mian mastreton, malgraŭ tio, ke li estas severa turmentisto, Dio pardonu lin.

Filipo, li foje diris, se vi deziras al mi plene plaĉi, vi devas ne sole helpi kaj servi en mia hejmo kaj oficejo, sed vi devas ankaŭ ne

forgesii *(blovite deklamas)*, ke vi havas honoran postenon de la servanto ĉe la Delegito de U.E.A. kaj - ha!-ha!-ha! - vi devas perfekte, senmakule uzi Esperanton. Mi vin akceptis, pro tio ke vi iomete posedis Esperanton, sed nun vi devas uzi ĝin kiel vian *(svingas per la viŝĉifono)* gepatran lingvon. Kal el tiu "devas" komenciĝas miaj ĝuoj kaj turmentoj. Se mi parolas en Esperanto sen eraroj - vespere mi ricevas bonan gluteton de brando aŭ konjako, se mi malbone uzas akuzativon (diablo ĝin prenu!) aŭ ian prepozicion *(kraĉas)* tuj komenciĝas skandalo! Se okaze mi kuraĝas paroli en mia hejmo mian nacian lingvon, fu! - kia batalo tuj okazas. Li frapas per la piedoj, tremigas min je miaj ŝultroj Bone etas por Agneso, se ŝi faras eraron - ŝin ĉiam defendas la sinjorino, sed min, malfeliĉulon, neniu volas defendi...

Por diri la veron, unuatempe mi pensis, ke mia mastro estas aŭ frenezulo, aŭ ia lerta fripono, uzanta la novan, malmulte parolatan lingvon, sed nun mi vidas, ke li laboras por ideala afero kaj mi pardonas al li ĉion kaj amas lin kun ĉiuj liaj strangaĵoj, kun ĉiuj akuzativoj kaj prepozicioj.

*(Movas la skribotablon)* Iu venas. Mi preparu min diri pri la mastro, tion, kion mi decidids.

### Sceno 2-a.

**Agneso:** *(venas kun plado sur kiu troviĝas kruĉo por kafo, taso kaj paro da bulketoj)* Bonan matenon, Filipino, kie estas mastro?

**Filipo:** *(severe)* Bonan matenon... *(iom indigne)* ne mastro, sed **la** mastro, vi, senartikola kapo!

**Agneso:** Nu, nu! Ne tro fanfaronu. Kia profesoro vi estas! Pli bone diru, kie estas la mastro? Ĉu li ne vekigis ankoraŭ?

**Filipo:** (*decide*) Jam antaŭ duonhoru li foriris el la hejmo. Diru al la sinjorino, kiam vi ŝin kombos, ke sinjoro majstro estis telefone vokita frumatene por tre urĝa afero. Okazis ia fervoja katastrofo, aŭ alia malbona akcidento, sed li tuj prenis la ĉapelon kaj foriris. Al mi li ordonis ke mi sciigu pri lia foresto la sinjorinon por ke ŝi ne maltrankviliĝu senbezone.

**Agneso:** Ha! mi ne kredas... Vespere mi ne aŭdis, kiam la sinjoro revenis hejmen, matene mi ne aŭdis, kiam li foriris. Kaj mi dormas tre proksime al la enirpordo!

**Filipo:** Dormulino vi estas! Ambaŭ fojojn mi mem devis malfermi la pordon. Kaj vi tiel dormis, ke oni facile povus pafi el pafilo apud vi kaj vi ne vekigiĝus.

**Agneso:** He, mi tamen ne kredas. Estas iaj sekretaĵoj. Sed ni eskcios (*minace*), ni ĉion vidos! (*foriras kun la plado, kafo kaj bulkoj*).

### Sceno 3-a.

**Filipo:** (*prenas la balailon kaj komencas bali, ekscitite kaj moke*) Sencerba ĵaluzulino! - Ni ekscios! - Ni ekvidos! Rostitan voston de diablo vi ekvidos, nenion plu!

(*Estas aŭdata laŭta frapo sur la fenestron kaj voĉo: "-Filipo, hej Filipo!"*)

(*La ĉi-suba dialogo kun la portistoj preferinde estu kondukata en nacia lingvo*)

**Filipo:** Kio okazis? (*venas al la fenestro kaj enŝoviĝas en la fermaĵon*) Ha! Joĉjo, Stefano, bonan matenon! Kion vi estas alportintaj?

(*La voĉoj: "-Malfermu do la pordon kaj enlasu nin"*)

**Filipo:** (*forirante la alian ĉambron*) Tuj - tuj...

(*Post kelkaj momentoj estas aŭdataj lia laŭta ĝemado kaj krioj: "Ho-ho-ho, mia Dio! Ho, malfeliĉo, ho, malĝojo! ho-ho-o!..."*)

(*Du homoj, simple vestitaj, enportas la korpon de inĝeniero Koaks kaj laŭ la monro de Filipo metas ĝin sur la kanapon, kiu staras sur videbla loko, iom oblikve al la publiko. Dume Filipo sin ĵetas tien kajaliloken, plaŭdas per la manoj, faras malfeliĉajn, sincerajn mienojn kaj laŭte ĝemas, parolante neligitajn, sensencajn frazojn*).

**Filipo:** (*tenante sin je la kapo*) Kie do vi trovis la malfeliĉulon, Joĉjo?

**Unu el la portistoj:** Tie, post la stratangulo. Li kuŝis tute senmova. Antaŭe ni opiniis ke li kuŝas ebria, sed poste ni vidis, ke li eĉ ne spiras. Do mi kaj Stefano prenis sinjoron inĝenieron kaj alportis ĉi-tien.

**Filipo:** (*metas en maltrankvilo la orelon al la brusto de inĝeniero Koaks*): Ha! vere eĉ la koro ne batas! Ha! karuleto mia...

**Portisto:** Ni foriras, Filipo; akceptu niajn kondolencojn. Pardonu ke ni alportis en vian hejmon la malfeliĉon.

**Filipo:** Mi dankas. Dio savu vin. Ni ĉiuj restos al vi tre dankemaj. (*La portistoj foriras.*)

### Sceno 4-a.

**Filipo:** (*sola; sin klinas al la brusto de l'mortinto. Unuan momenton li silentas, sed poste aŭdiĝas pli laŭtaj ekploretaj*) Khe-khe... Karulo vi nia... Khe-khe... Senkompara vi nia... Khe-khe. Tia glora homo, tia bona inĝeniero kaj estas pereinta sur la strato kiel la plej lasta almozulo. Khe... khe. En tia juneco vi pereis. Tian belan

edzinon vi lasis... Kiom da homoj ĉiam vizitadis nin. Kiaj brilaj nomoj. Kiaj riĉaj vestoj. Kiaj graciaj virinoj. Khe-khe... Kaj nun ĉio estas forfluginta. Pereos nun la tuta nia hejmo, ĉio pereos sen vi, kara nia. Kaj mi, kien nun mi iros? Kie mi trovos tiom da feliĉo, kiun mi havis ĉevi? Khe-khe... Malgraŭ ĉiuj viaj strangajoj. Khe-khe... Malgraŭ ĉiuj akuzativoj kaj prepozicioj...

*(Iom kvietiginte, sin levas kaj rigardas la korpon de supre)*

Kiel li ŝanĝiĝis, kompatinda! Kiel pala li estas, la nazo akriĝis, la okuloj enfalis, la lipoj kunpremiĝis, karulo nia, kiel, kiel viŝanĝiĝis! Tamen mi devas ja kovri la mortinton. Ne decas ke li kuŝu tia senorda kaj taŭzita. *(Foriras la alian ĉambron.)*

#### Sceno 5-a.

**Agneso:** *(venas kun la sama plado kaj kafo, rigardas ĉirkaŭe kaj metas la pladon sur la tablon; mallauĉte)* Sinjoro, sinjoro!... Dormas... *(venas pli proksimen kaj tuŝas la korpon je ŝultro; moke)* Bonega li tamen estas! Tiel ebria! Ĉu mi ne diris al tiu sentaŭgulo Filipo, ke nia mastro fariĝis diboĉulo. Jen por vi la pruvo. Kuŝas kvazaŭ ŝtono. Sinjoro! *(pli laŭte)* Sinjoro!

#### Sceno 6-a.

**Filipo:** *(eniras kun granda blanka tuko; moke)* Sinjoro, sinjoro... kion vi krias? Tute egale la mastro vin ne aŭdas kaj neniam plu aŭdos. Li pereis kiel heroo sur sia inĝeniera posteno. Venu kaj sciigu la sinjorinon pri la malfeliĉo. Sed ne uzu vian maldelikatan langon tro longe. Elektu la vortojn. Alie mi montros al vi! *(minacas per la mano.)*

**Agneso:** *(kun timo, kaptas lin je maniko)* Filipo, Filĉjo, ĉu vi ne ŝercas? Je Dio, ĉu estas vero?

**Filipo:** Ĉu oni ŝercas tiamaniere? Ĉu vi mem ne vidas? Oni ĵus alportis la mastron, mortintan sur la strato. Helpu al mi kovri lian vizaĝon. *(Agneso helpas, poste ŝi kovras sian vizaĝon per manpladoj kaj ekploretas.)*

**Agneso:** Mi preskaŭ ne kredas, ho Dio mia! Ho! mia malfeliĉa sinjorino. Kiel mi diros al ŝi la kruelan sciigon? *(foriras)*

#### Sceno 7-a.

**Filipo:** *(prenas la telefonan aŭdilon sur la tablo kaj parolas, preferinde en nacia lingvo)* Halo! Dek tri - sepdek kvar! Jes, mi dankas! Ĉu estas la entrepreno de funebraj procesioj? Bonege, bonvolu sendi tuj ĉerkon, el kverko, kun bona kaj gustoplena ornamaĵo. La adreso estas: Longa strato, ĉe inĝeniero Koaks. La pagon vi ricevos post livero de la ĉerko? Kia longeco? Mi penas, ke dumetra longeco estas sufiĉa. Do ne malfruigu! *(lasas la aŭdilon)* Nun mi devas inviti Marinjon ke ŝi venu vespere por lavi la mortinton. Poste ni devas sciigi la policon pri la akcidento. Nun ni havos multe da klopodoj *(foriras)*.

#### Sceno 8-a.

**Heleno:** *(sinĵetante al la korpo de Koaks)* Aleĉjo, mia kara! Ha! *(kelkan tempon restas senmova. Agneso staras flanke, ferminte la vizaĝon per la mano. El la pordo, kaŝeme, enpaŝas Filipo kaj rigardas. Agneso montras al li per signoj, ke li foriru, sed Filipo ne konsentas kaj ofendite montras al Agneso ke ŝi mem lasu la*

*ĉambron).*

**Heleno:** (*leviĝinte kun dolora mieno*) Do jen! Kia amara sorto. Mi-m-mi mi estas jam vidvino...(*svenas; Filipino subtenas sin kaj metas sur la apogseĝon; Heleno rekonsciiĝinte*) Filipino kara, prenu nun la mastrumon en viajn manojn. Voku la necesajn homojn, ordigu ĉion, mendu la ĉerkon. Ni ja estas malfortaj virinoj, tute maltaŭgaj, Filipino.

**Filipo:** (*leviĝinte kun dolora mieno*) Ho ne maltrankviliĝu kaj ne zorgu, kara sinjorino. Mi jam ordonis alporti la ĉerkon kaj vokos ĉiujn necesajn helpantojn. Mi ĉion, ĉion plenumos. Mi bone scias, kiel vi estas premita per malfeliĉo kaj Agneso, ŝi ja estas virino simpla, tute maltaŭga por tiu okazo. Ŝi restu kun vi.

**Agneso:** (*ofendite*) Vi mem taŭgas por nenio, vi nur estas kapabla ĝemi kaj hai. Vi estas kulpa, ke la mastro mortis. Vi ĉiam kaŝis de la sinjorino liajn aventurojn. Se vi ne kaŝus, ŝi certe siatempe retenus la edzon de pere.

**Filipo:** (*indigne*) Silentu! Kial vi malkvietigas la honoran nomon de la mortinto? Hontu antaŭ lia kadavro.

**Heleno:** (*kun gesto*) Agneso, Filipino, kion tio signifas? Ĉu vi volas fari ĵaluzajn skandalojn apud la kadavro kaj antaŭ mi, malfeliĉa vidvino? Nur tio mankis!

**Filipo:** Ho, mi neniun ja volis ofendi. Nur ke ŝi lasu la mastron en kvieto.

**Agneso:** Kaj vi lasu min kun viaj arogantaĵoj kaj pikoj.

(*Sonorilo*)

(*Venas Ranunkol, rapide enpaŝas en la ĉambron, kisas la manon de Heleno kaj ĝentile ekparolas*)

**Ranunkol:** Tre estimata sinjorino! Nia kortisto Joĉjo ĵus sciigis min pri la malfeliĉa morto de sinjoro via edzo. Kia granda

perdo, kia malfeliĉo! Mi permesis al mi sciigi sinjoron Prezidanton de nia Societo kaj li bedaŭrinde ne povis veni tuj. Ni venos iom pli poste. Ni ĉiuj estas tre frapitaj. Je la nomo de la funebranta Societo, s-ro Rabat sendis al vi ĉi tiun karton (*donas la vizitkarton al Heleno*)

**Heleno:** (*rigardas kaj unutone, lace legas*) Kara Sinjorino! Terure frapitaj, ni ĉiuj esperantistoj de la loka Esperanta Societo kun kora malĝojo funebras la perdon, kiun sendis al la Societo la sorto. Ni petas vin akcepti niajn sincerajn kondolencojn pro la morto de via altestimata edzo, kies memoro restos en niaj rondoj por eterna monumento. Ni esperas honorigi la mortintan sinjoron Delegiton per la alveno de nia multenombra verdstela anaro, kiu venos por diri al via edzo la lastan saluton. (*metas la karton sur la tablon*) Tre kortuŝe, s-ro Ranunkol, tre kortuŝe. Viaj kondolencoj multe helpas al mi elporti la malfeliĉon. Venu, karaj samideanoj, en via rondo mi ne sentos min tiel sola.

**Ranunkol:** Do permesu al mi dume saluti vin, sinjorino, kaj mi lasos vin por ne ŝteli vian tempon, kiun vi nun tre bezonas (*riverencas kaj foriras*).

**Heleno:** (*al Filipino*) Do faru ĉiujn necesajn klopodojn, Filipino, invitu la konatulojn, vi ja ilin bone konas.

**Filipo:** Bone, ne maltrankviliĝu, sinjorino. Mi ĉion faros, mi ja ne estas Agneso (*foriras*).

**Agneso:** Kaj ĉiam tiel, ĉiutage! (*al la publiko*) Jen kio fariĝas viro, kiam oni ne akceptas liajn amindumaĵojn (*Heleno kaj Agneso foriras. Helenon subtenas Agneso sub kubuto.*)

(*La scenejo unu minuton restas malplena.*)

Sceno 9-a.

*(Inĝ. Koaks moviĝas, poste demetas la kovrilon de la brusto, elpoŝigas cigaredon kaj ekfumus. Poste leviĝas kun taŭzita mieno).*

Fu! Kiel la kapo doloras!... *(ĉirkaŭrigardas la kabineton).* Diablo min formanĝu, se mi ekmemorus, kiamaniere mi hieraŭ trafis mian kabineton! *(rigardas la kanapon).* Jen bonulo Filipino - li eĉ kovris min per la tuko kontraŭ la muŝoj. *(Sidiĝas en la apogseĝon kaj dolĉe, malrapide fumus; reveme)* En la vivo de ordinara homo dudek jaroj signifas grandan periodon, sed kiom pli multe ili signifas en la vivo de esperantisto! Imagi nur, ke ĝuste antaŭ dudek jaroj studento Koaks kun lia ĉiama amiko Alfredo Filigran prenis en la manojn unuafoje la gramatikon de Beaufront por studi la internacian lingvon. Ŝajnis esti nur simpla junula scivolemo, kiu nin puŝis eklerni la lingvon. Ni ne estis tiam eĉ kredintaj ke preparante nin por la seka kariero de inĝenieroj ni daŭrigos la Esperantan laboron. Kaj jen pasis dudek jaroj kaj mi restas ĝia fervora adepto kiel ĉiam. Kiom da pura, virga ĝojo mi ricevis el tiu movado, eĉ da malĝojo kaj doloroj!

Kiel nun mi memoras la impreson, kiun mi ricevis, leginte la raporton pri la Unua Kongreso de Bulonjo sur Maro, pri la paroladoj de nia Majstro, de entuziasmulo Micheaux kaj de aliaj... Kaj poste, la atako de Markizo Luis, lia perfido, foriro de multaj bonaj samideanoj, la herezo de René de Saussure - ho, kiom Esperanto multajn kordojn ektuŝas en mia koro ĉi tiuj paĝoj de nia movado.

Kaj mia propra laboro, kies fruktojn mi vidas sur ĉiu paŝo. Miaj gramatikoj de Esperanto estas vendataj ĉie tra la lando. Mi devus havi dudek manojn por laŭfingre elkalkuli ĉiujn kursojn, kiujn mi gvidis. Ĉiu en mia hejmo, eĉ la servistoj, parolas fluan

Esperanton... Min vizitis kiel Delegiton jam dekoj da alilandaj samideanoj... Tiel ili forpasis, la dudek jaroj...

*(Stariĝas kaj promenas, gaje)* Do ne estas mirinde, ke hieraŭ, kiam ni renkontiĝis kun Alfredo ĉe la komitata kunveno en la Societo, ni tuj rememoris la dudekjaran datrevenon de mia esperantiĝo. Niaj animoj moliĝis, ni prenis unu la alian, brako ĉe brako, kaj iom poste trovis intiman anguleton en la restoracio "Ora Korno". La ĉampana ŝaŭmo baldaŭ estingis nian entuziasmon kaj pro ĝi ankaŭ rompiĝis mia memorkapablo. Bone mi memoras, kiel ni pagis, kiel ni eliris kun Alfredo sur la straton, kiel agrable tuŝis miajn vangojn la malvarma aero kaj... stop! Poste mi kvazaŭ falis en abismon! Nun mi vidas min kuŝanta ĉi tie sur la kanapo; vestita, makulita per koto. Certe Filipino rakontos al mi la mankantan en mia memoro parton de miaj hieraŭaj aventuroj. Mi lin tuj vokos... *(iras al la pordo; telefono sonoras; Koaks paŝas al ĝi; [parolas] preferinde en nacia lingvo)* Ha lo! Tie ĉi estas inĝeniero Koaks. Kio?... Ĉerkon?... Entrepreno de funebraj procesioj?... Ĉu vi ne eraris je numero?... Vi ne havas je du metroj longan ĉerkon, sed ĉu min tio koncernas? *(al la publiko)* Videble Alfredo aŭ alia spritulo volis ŝerci pri mi kaj telefone mendis por mi ĉerkon! Ha-ha-ha! *(en telefonon)* Kion al vi diri?... Certe, kiu nun bezonas la ĉerkon estas sinjoro inĝeniero Alfredo Filigran, Kurba strato, n-ro 7... jes, jes, numero sep... Bonvolu... Ĉiujn bonaĵojn... *(lasas la aŭdilon)*

Kia infana ŝerco! Videble Alfredo venis hejmen pli sobra ol mi.

Tamen, kial neni venas? Jen staras la kafo *(gustumas)*. Fi! - ĝi estas tute malvarma. *(vidas kaj prenas la karton)* La karto de s-ro prezidanto Rabat, datita hodiaŭ... Ĉu li ankaŭ faras ŝercon?

"Kara Sinjorino! Terure frapitaj, ni ĉiuj esperantistoj de la

loka Esperanta Societo kun kora malĝojo funebras la perdon, kiun sendis al la Societo la sorto. Ni petas vin akcepti niajn sincerajn kondolencojn pro la morto de via altestimata edzo, kies memoro restos en niaj rondoj por eterna monumento. Ni esperas honorigi la mortintan sinjoron Delegiton per la alveno de nia multenombra verdstela anaro, kiu venos por diri al via edzo la lastan saluton."

Ha! tio jam ne odoras kiel ŝerco! Nia seriozulo Rabat neniam permesus al si fari similajn ŝercojn, des pli ke li sin turnas al mia edzino! Kion ĉio ĉi signifas? Aŭ eble oni ĉion akceptas jam kiel plenumiĝintan ffakton; ke mi jam ĉe ĉiuj estas registrita mortinta! Stranga situacio! Mi ne scias kion fari (*hezitas*).

Ha, iu venas... Mi do daŭrigu iomete la komedion, kaj mi elektu por la reviviĝo de Lazaro pli konvenan momenton. Sinjoro Koaks bonvolu forveturi al alia mondo (*kovras sin per la tolaĵo kaj kuŝas kviete*)

## Parto II-a

### Sceno 1-a

*(Heleno venas helpata sub la brako de Bemol, elegante vestita sinjoro)*

**Heleno:** Jen estas li, la malfeliĉulo. Imagu nur, kara Bemol, ke mi leviĝis hodiaŭ en tre bona humoro - mi vidis tre belan idilian sonĝon, ke mi estis vaginta tra ĝardeno plena de floroj; imagu do mian teruron, kiam al mi venis Agneso kaj sciigis pri la funebro. Mi pensis, ke mia koro krevos pro malfeliĉo...

**Bemol:** Sed kiel tamen ĉio okazis? Hieraŭ mi vidis lin dum la komitata kunsido tute gajan kaj sanan. Li foriris kun s-ro Filigran

en tre senzorga, intima paro. Mi tute ne komprenas, kio estis la kaŭzo de lia morto. Ĉu li havis la koron en bona ordo?

**Heleno:** En bonega! Ni ankaŭ ne scias, kial kaj kiam li mortis, sed la kortistoj de niaj najbaroj trovis lin ĉe la proksima stratangulo kaj alportis hodiaŭ frumatene. Verŝajne lian morton elvokis ia komplika malsano. Ni atendu kion diros la kuracistoj. Mi opinias, ke ili insistos pri la sekcado de la kadavro. Mi preferus, ke oni tion ne faru.

**Koaks:** (*el sub la tuko, al la publiko*) Ankaŭ mi preferus!

**Bemol:** (*al si mem*) Tamen ĉio okazas tiel neatendite, kvazaŭ laŭ la antaŭzorgo de Providenco. Ĉu ne estas miraklo ke tiu ĉi morto kvazaŭ malfermas por mi eliron el la labirinto, en kiu mi ĝis nun vagis?

**Heleno:** Pri kio vi parolas, Bemol?

**Bemol:** Ĝus venis al mi ideo, ke en nia vivo oni povas konstrui la feliĉon nur sur la malfeliĉo de la alia.

**Heleno:** Mi ne komprenas, Bemol. Kial vi subite fariĝis filozofiema?

**Bemol:** Pro la cirkonstancoj. En mia kapo subite aperis, kvazaŭ fajrera penso, ke jen ĉi tie rompiĝis la feliĉo de unu homo, povus naskiĝi la feliĉo de alia.

**Heleno:** Kial vi parolas per enigmoj?

**Bemol:** Ĉu vi volas, ke mi estu malkaŝa?

**Heleno:** Certe, vi devas. Mi esperas, ke vi ne diros tamen ion ekstreman; ne forgesu ke antaŭ vi estas malfeliĉa vidvino antaŭ la malvarma kadavro de ŝia edzo.

**Bemol:** Mi ne diros ion ekstreman, sed mi diros la veron. Mi opinias, Heleno, ke miaj vortoj, kvankam akraj kaj nekonvenaj, ekvekos en via animo ion novan, kio vin esperigos kaj helpos al vi



pli facile elporti la malfeliĉon. Kaj vere, ĉu tro granda malfeliĉo ĝi estas?

**Heleno:** Ho, kompatu min vi, terura Bemol!

**Bemol:** Mi nur konstatas la veron. Ĉu vi estis plene feliĉa kun tiu ĉi iluziulo (*montras la kadavron*), kiu anstataŭ amuzigi sian belan kaj viglan edzinon, fordonadis la tutan sian temponal iluzioj, al propagando de ĉiaj infanaĵoj?...

**Heleno:** Bemol! Bemol! Pripensu, kion vi parolas! Vi mem ja estas unu el la plej fervoraj samideanoj - Subdelegito de U.E.A.! Ĉiama helpanto de mia edzo!

**Bemol:** Ho, lasu tion, kara Heleno. Ĉu ne estis por vi klare, ke mi lernis kaj propagandis Esperanton kaj fariĝis Subdelegito por esti ĉiam apud vi, por vidi vin kiel eble plej ofte kaj servi al vi en via intima rondo? Mi sukcesis al militi vian konfidon kaj, al mi ŝajnas, ke pli ol konfidon...

**Koaks:** (*el sub la kovrilo*) Jen li, fripono!

**Heleno:** Vi min embarasigis, Bemol. Mi sentas ke en mia kapo ĉio miksiĝas...

**Bemol:** Do vi ne forpuŝas? Do vi komprenas? Heleno, Heleno, ĉu preferus vi tiun putrontan karnon (*iras al la kadavro, frapas ĝin kaj sin duonturninte diras al Heleno*) al la koro flama, kiu batas por vi en mia brusto? (*Koaks donas al li baton sur la dorson*) Oj! (*Bemol sidiĝas kaŭre kaj ĝemas*)

**Heleno:** Kio okazis?

**Bemol:** Ŝajnis al mi... N-ne, ne povas esti! Verŝajne tio estas pro ekscitiĝo... (*frotas la talion*) Sed kial ĝi tiel doloras? Mi ne komprenas. Hm! Hm!

**Heleno:** Anstataŭ min turmenti, Bemol, telefonu al mia tajlorino, ke ŝi faru al mi plej rapide funebran veston.

**Bemol:** (*sidiĝas al la tablo, kun la dorso al Koaks. Heleno venas enpenŝiĝe al la fenestro*) Du - sepdek sep. Ĉu estas sinjorino Pasament? Ĉi tie - via konatulo Bemol. Mi parolas je la nomo de sinjorino inĝenieredzino Koaks. Ŝi bezonas kiel eble plej rapide funebran veston. Kian? La plej malmultekostan, simplan, tre moderan, el malkara ŝtofo. Ŝi esperas, ke ŝi ne portos ĝin tre longe! Ne, ne, mi ne ŝercas.

(*Koaks trovas sub la kanapo pantoflon kaj forte ĵetas ĝin sur la dorson de Bemol*)

**Bemol:** (*eksaltas*) Oj! Jen, denove! (*lasas la telefonon*)

**Heleno:** (*kvazaŭ renkonsciigante*) Kio vin turmentas?

**Bemol:** Se mi ne estus ateisto, mi kredus ke en via hejmo la diablo montras siajn ŝercojn. Denove iu min batis sur la dorson.

**Heleno:** Iru kaj ripozu iomete, Bemol. Videble vi ankaŭ estas tre ekscitita pro la morto de mia edzo. Mi tion vidas kaj mi ĉion komprenas. Jen vi parolas pri koraj sentoj, jen vi vidas fantomojn. Do ĝis revido. Jen al vi mia mano. Kaj restu mia amiko kiel ĝis nun.

**Bemol:** Mi ne komprenas, kion signifas tiuj batoj sur la dorson, sed koncerne al mia amo mi estis vera, tute vera kaj mi ne pereigos en mi la esperon...

**Heleno:** Do ĝis revido! (*Bemol kisas ŝian manon kaj foriras*) Bone ripozu kaj venu al ni kun freŝaj fortoj por helpi.

(*Bemol foriras, frotante la talion*)

**Heleno:** (*sola*) Kia terura, freneza tago! Ho, ĉielo, tiel kruele forpreninta mian feliĉon! (*Kliniĝas kaj obtuze ploras*)

(*Koaks jen leviĝas en embaraso, jen denove kuŝiĝas; Heleno lin ne rimarkas; aŭdiĝas paŝoj; Koaks rapide sin ŝovas sub la tukon kaj kuŝas kvietaj*)

Sceno 2-a

**Agneso:** *(el la pordo)* Sinjorino, sinjorino!...

**Heleno:** *(konsciiĝinte)* Kion vi bezonas, Agneso?

**Agneso:** Venis la esperantistoj Rabat kaj Ranunkol.

**Heleno:** Petu ilin.

*(Eniras Rabat, kisas la manon de Heleno; Ranunkol, kun preta skribkajero en la mano, ĝentile reverencas)*

**Rabat:** E-e-estimata kaj kara sinjorino!... Permesu al mi persone kondolenci vian senfinan malfeliĉon *(kore)* Kredu al mi, ke via malĝojo, malĝojo de juna virino perdinta sian amatan edzon, tre, tre tuŝas min. Ĉiuokaze, estante via bona amiko, mi estas preta helpi vin ĉiel, kiel mi povas.

**Heleno:** Mi tre dankas, s-ro Rabat, mi estas vere kortuŝita. Mi ĉiam pensis, ke vi devas esti tre bonkora kaj nun mi tion klare vidas.

**Rabat:** Je la nomo de la Societo kaj je la nomo de ĉiuj U.E.A.-anoj de nia urbo mi venis vin sciigi, ke ni decidis en multnombro partopreni la enterigan procesion de via edzo.

*(Koaks turniĝante sub la tolo: Tre kortuŝe!)*

Nia kara sinjorino! Ni petas vin donni al ni kelkajn informetojn pri via edzo, kiujn ni bezonos por sciigi pri lia morto al Esperantaj gazetoj.

**Heleno:** Volonte mi donos. Sed ĉu estas necese fari tro multe da bruoj? Mia edzo ja estis ĉiam tre modesta homo.

**Rabat:** Kontraŭe, ĝuste pri la modestuloj ni bezonas pli vaste paroli, ĉar ili plejparte kondukas nian movadon. Sinjoro Ranunkol, bonvolu demandi la sinjorinon laŭ la rubrikoj.

**Ranunkol:** *(tenante kajeron, kiel gazeta intervjuisto)* Kara

sinjorino! Kiam kaj kie naskiĝis via altestimata mortinta edzo?

**Heleno:** Li naskiĝis en nia urbo en la jaro 1887-a.

**Ranunkol:** Lia patro?

**Heleno:** Lia patro estis la urba arĥitekturo.

**Ranunkol:** Bone! Kie li studis la sciencojn?

**Heleno:** Komence tie ĉi, sed la specialajn teknikojn en Lieĝo, Belgujo, kie li ankaŭ konatiĝis kun Esperanto.

**Ranunkol:** Bone, bone! Nun, permesu, gesinjoroj, ke mi tralegu al vi la nekrologon, kia ĝi devus aperi en la gazetoj.

**Heleno kaj Rabat:** Bonvolu, ni petas!

**Ranunkol:** *(legas)* Kun kora malĝojo ni sciigas la esperantistaron pri la morto de nia fame konata samideano kaj Delegito de U.E.A., s-ro inĝeniero Aleksandro Koaks. Li naskiĝis en 1887-a jaro en la familio de la urba arĥitekturo de urbo (Zagrebo\*), studis siajn teknikajn sciencojn en Lieĝo, kie li konatiĝis kun Esperanto. Li multe laboris por nia movado kaj havis grandan korespondadon kun samideanoj tra la mondo. Neniu el liaj korespondantoj povus lin iam riproĉi, ĉar li sciis esti tre punktuale en la respondoj kaj diversprezajn markojn ĉiam gluis sur la poŝtkartoj bildflanke. Eternan memoron al nia kara kunfrato! *(faras riverencon.)*

**Heleno:** *(apenaŭ sin retenante de la rideto)* Tre, tre kortuŝe. Mi vin kore, sincere dankas por ĉio, sinjoroj.

*(Rabat kaj Ranunkol, salutante, foriras kun seriozaj mienoj. Antaŭ la foriro ili retenigigas apud la kadavro kaj balancas kun kompatato la kapojn)*

**Heleno:** Ho, kruela mondo! *(moke)* Li estis senriproĉa korespondanto, li gluis la poŝtmarkojn bildflanke! Kiam fine la esperantistaro elkreskos tiom ke almenaŭ per deca nekrologo pagu al

la senlacaj pioniroj... (*foriras*)

**Koaks:** (*sidiĝinte sur la kanapo, al la publiko*) Ha! en kian tragikomedion mi trafis hodiaŭ. Vere, la konatuloj fakte estas tute aliaj, ol mi ilin prezentis al mi. Videble la poŝtmarkoj kaj bildoflanka surgluo de ili estas por multaj pli interesaj ol mia longjara laboro kaj propagando de Esperanto... (*aŭskultas*) Jen, denove iu venas. S-ro Koaks, al via senfadena observejo! (*kuŝiĝas sub la tolon*).

### Sceno 3-a

(*Agneso kaj ĉerkisto parolas preferinde nacie*)

**Ĉerkisto:** (*daŭrigante la paroladon*) ...Kaj mi diris ke ni havas nur je du metroj... Sed li ŝerce diris, ke mi alportu mian ĉerkon laŭ alia adreso. Tial mi venis por poprokule vidi la mortinton, mezuri lin kaj preparoli la prezon. Ĉu estas permesite elmezuri la mortinton?

**Agneso:** Bonvolu. Nur pri la prezo vi preparolu kun nia servisto Filipo. Li devas veni post kelkaj minutoj. La sinjorino transdonis al li la tutan mastrumadon.

**Ĉerkisto:** Bone! (*elpoŝigas la centimetran mezurilon. Mezuris. Dume Koaks sub la tuko etendas la korpon kiel eble plej longe kaj el siaj pugnoj faras kvazaŭ kapon. Ĉerkisto mezuras kaj rigardas la mezurilan rubandon*) Du metroj kaj duono! Kia altulo estis la mortinto. Tio ne povas esti... Hm! hm! (*Dume Koaks kuntiriĝas kiel eble plej mallonge. Agneso prenas la ĉifonaĵon kaj komencas froti la fenestron kvazaŭ viŝante la akvon*) Ni do mezuru ankoraŭfoje. Eble mi eraris? (*mezuras*) Unu metro kaj sepdek centimetroj! Kion tio signifas? Ĉu oni ne faras ian komedion je mia

konto? (*Koaks prenas la normalan pozon. La ĉerkisto palpas la korpon, levas la tukon kaj rigardas la mortinton*) Ne... ĉio estas en ordo... (*ree mezuras kaj krias*) Du metroj!!! Kia diablo? Trifoje ĉiam la malsama! (*Koaks denove longiĝas*) Nun! (*mezuras kaj rigardas*) Du metroj kaj tridek centimetroj! (*Sin turnante al la publiko, kun grandaj okuloj*) Aj-aj-li estas sorĉisto! (*kriante, rapide forkuras*)

**Agneso:** Ĉu li freneziĝis? Kia terura tago! Kion ni nun faros kun la ĉerko? (*foriras*)

**Koaks:** (*sola, leviĝas kaj ordigas sin*) Do la tragikomedio venas al sia fino. Plu ĝin daŭrigi ne havas la sencon. Alie oni surprizos min per tiaj surprizoj ke mi efektive perdos ĉian deziron reveni la teran mondon. Krom tio, ĉiuj turmentoj falas sur mian karan edzineton kaj mi min sentas kulpa antaŭ ŝi. Do, sinjoro Koaks, reviviĝu por pli granda gloro! Iu frapas... Ŝajne estas fremdulo, la konatulo ne frapas sur la pordon de la ĉambro, kie troviĝas mortinto (*laŭte*) Antaŭen! Bonvolu!

### Sceno 4-a

**Willy Hju-ám-ám:** (*en pluvmantelo, kun valizo en la mano, rigardas kaj ridetante montras blankajn dentojn. Liaj okuloj moviĝas dekstren kaj maldekstren*)

**Koaks:** (*timiĝinte*) Ĉu... ĉu... mi sonĝas?... Kion tio signifas?

**Willy:** Bonan matenon, sinjoro! Ĉu vi estas s-ro inĝeniero Koaks, Delegito de U.E.A.?

**Koaks:** Ha! Esperanto! Kie ĝi estas - ne estas la fantomoj. Bonan matenon, kara samideano! Jes, mi estas la Delegito Koaks. Kiamaniere mi povus al vi servi? Bonvolu vi senvestigi (*helpas*) kaj

sidiĝu (*donas la seĝon*)

**Willy:** Mi estas Willy Hju-ám-ám, esperantisto el Monrovia, Liberio. Mi vojaĝas tra la mondo kaj legas la lekcionojn pri mia lando, kun lumbildoj, kiuj montras la belajn pejzaĝojn kaj ne malpli belajn enloĝantojn de mia naskolando. Mi vizitas ankaŭ vian urbon por fari la samon. Ĉu vi ricevis mian leteron, kiun mi sendis al via adreso el Parizo?

**Koaks:** Ne, ĝis nun ankoraŭ mi ne estis ĝin ricevinta.

**Willy:** Tre bedaŭrinde. Alie mi tiel miris ke min neniu renkontis ĉe la stacidomo. Same ĉe vi, ĉiuj pordoj estas malfermitaj, sed neniu min renkontis. Mi do longe frapis sur la pordon, mi vidis sur ĝi tabuleton kun via nomo kaj post iom da tempo, estante tre laca, permesis al mi eniri en la loĝejon. Feliĉe ke mi renkontis vin tuj, sen ĝeno.

**Koaks:** Vi do intencas legi lekcion pri via lando en nia urbo. Volonte mi kaj ĉiuj lokaj samideanoj vin helpos. Ni antaŭe garantias al vi plenan sukceson.

**Willy:** Dankon! Mi nur petus vin, estimata sinjoro Delegito, ke vi donu al mi la adreson de iu pura hotelo, en kiu oni povus paroli se ne Esperante, do almenaŭ angle.

**Koaks:** Ne maltrankviliĝu, mi petas. Mia hejmo ĉiam servas kiel bona restadejo por ĉiuj fremdaj samideanoj, kiuj vizitas nian urbon. Des pli ke vi estas la unua reprezentanto de la nigra esperantistaro en nia lando.

**Willy:** Sed mi ne volus vin ĝeni.

**Koaks:** Kia ĝeno! Jen al vi oportuna kanapo. La unuajn minutetojn bonvolu resti tie ĉi kaj poste mi montros al vi la ĉambron. Sed vi ne faru la ceremoniaĵojn. Amike, bonvolu! (*Willy sidiĝas sur la kanapon. Koaks alportas la li skatoleton da cigaredoj,*

*botelon da brando*). Ĉu vi fumas? Ĉu vi ne estus kontraŭ unu gluteto da nia nacia fiero? (*Klakas per la fingro sur la botelon. La negro ridas, montrante blankajn dentojn*)

**Willy:** Laŭ via permeso. (*Gustumas la glaseton da brando kaj poste, ekfuminte la cigaredon, prenas oportunan pozon sur la kanapo*). Vi estas treege kompleza, s-ro Delegito!

**Koaks:** Estas malgravaĵo! Kara sinjorino, -e-hm-hm, kiel estas via ŝatata nomo?...

**Willy:** Willy Hju-ám-ám, mi petas.

**Koaks:** (*maldecide*) Do, sinjoro Hju-ám-ám, mi tiel prezentas al mi la servon, kiun mi devas por vi fari. Hodiaŭ mi kunvokos la eksterordinaran kunsidon de la Societa Komitato. Ni tuj delegos iun por lui la konvenan salonon...

**Willy:** (*endormiĝante*) Jes... b-on-n-volu...

**Koaks:** Poste ni faros la anoncojn en gazetoj kaj presos la afiŝojn. Niaj amikoj ĉiel kaj ĉie propagandos la vesperon. Ni invitos la urbajn kaj ŝtatajn aŭtoritatojn. Ni faros la lumreklamojn en la kinoteatroj.

**Willy:** (*jam preskaŭ dormante*) J-e-es.

**Koaks:** (*mallaŭte al la publiko*) Li endormiĝas... Kia bona eliro por mi. Nun mi povas facile kaj senĝene lasi la komedion, kiel aganta persono. (*serce*) Sinjoro Hju-ám-ám, transloĝiĝu nun vi al la alia mondo! (*Metas liajn piedojn sur la kanapon kaj kovras lin per la tuko*) Nun estas bezone, ke mi malaperu nevidite (*kaŝe rigardas post la pordo*) Neniu estas. (*svingas salute per la mano kaj foriras*).

Sceno 5-a

**Heleno:** (*venas kaj sidiĝas apud la tablo por skribi*) Ha, kian

teruran sciigon ricevos miaj gepatroj! Tio ilin tute mortigos. Volonte mi ne sendus la telgramon. *(skribas)* "Karaj miaj. Eble alveturu tuj. Aleksandro mortis. Helena." *(ploretas)* Ho, kiel ili estos frapitaj.

**Agneso:** *(alportas kelkajn leterojn)* Jen estas la poŝto, sinjorino! *(foriras)*

**Heleno:** *(rigarde la kartojn kaj malfermante la leterojn)* Ho! mia kara Saĉjo, kiel malmulte koncernas vin nun tio, kion al vi skribas viaj bonaj amikoj. *(prenas sigelitan paketon kaj mire legas)* El Parizo? Sigelita? Tre urĝa? Kaj la surskribo: Delegito de U.E.A. sen ia persona nomo! Strange! Ĉu ne estus pli bone se mi transdonus la leteron al la esperantistoj. Ĉar mi mem havas nek tempon, nek ian rajton por ĝin malfermi. *(prenas la telefonon)* Dek-dek tri. S-ro Ranunkol? Ne estas hejme? Do bonvolu diri al li, se li revenos, ke lin petis al sia hejmo sinjorino Koaks. Ĉu vi diros? Mi tre dankas... *(metas la aŭdilon kaj meditas)* Eble pli bone estus, se mi transdonus la leteron al s-ro Bemol? Li ja estas nun plenumanta la postenan devon de l'mortinta Delegito. Sed li tiel koleriĝis hodiaŭ. Parolis sensencaĵojn, eĉ kontraŭ Esperanto mem. Eble la rolo de Delegito lin iom kvietigos *(prenas la aŭdilon)* Naŭ-kvindek kvar. S-ro Bemol? Mian saluton, s-ro Bemol; mi estas tiel konfuzita, pro nia hodiaŭa interparolo... Pardonu min kore, mi nun tre bezonas vin. Vi estus tre bonvola, se vi povus veni al mi tuj. Mi transdonos alvi unu urĝan leteron... Mi dankas, dankas... Ĝis...

**Filipo:** *(venas)* Uf! Tiuj policaj hokoj! Kiom da tempo mi pereigi ĉe la komisaro... *(vidante Helenon)* Kara sinjorino, ĉu vi min bezonas?

**Heleno:** Ne, vi estas libera. Vizitis nin la ĉerkisto, kiun vi invitis, sed io okazis. Demandu Agneson, ŝi estis dum lia vizito. *(vokas)* Agneso!

**Agneso:** *(venas)* Kion vi bezonas, sinjorino?

**Heleno:** Kio okazis al la ĉerkisto?

**Agneso:** Mi ne scias. Li venis tien-ĉi, poste mezuris la mortinton kaj subite ekkriinte, forkuris.

**Filipo:** Forkuris? Ĉu li ne estis ia ŝtelisto, fripono?

**Agneso:** Mi ne scias. Li venis laŭ via invito.

**Filipo:** *(maltrankvile)* Eble li ŝtelis ion? Ni vidu, ĉu la monujo de sinjoro inĝeniero estas ankoraŭ en lia poŝo. *(venas al la mortinto, demetas la tukon iom flanken kaj elprenas la monujon)* Dank' al Dio. Estas tie ĉi! *(rigardas en la monujon)* Kiel multe da dolaroj, rigardu, sinjorino, kiom multe da ili!

**Heleno:** Dolaroj? De kie estas la dolaroj? Mia edzo neniam tre interesiĝis pri valuto kaj borso.

**Filipo:** *(donante al ŝi la monujon)* Tamen vidu!

**Heleno:** *(rigardante)* Efektive! Kial li neniam diris al mi ke li havas tiom da dolaroj? *(dume Filipino forportas la valizon kaj veston de Willy en la alian ĉambron, poste revenas)*

*(Aŭdiĝas frapo kaj venas S-ro Ranunkol)*

**Ranunkol:** *(al Heleno)* Jen estas mi, sinjorino. Vi min vokis.

*(Aŭdiĝas frapo kaj venas S-ro Ranunkol)*

**Heleno:** Jes, mi dankas, s-ro Ranunkol. Mi ricevis inter la cetera poŝto, ankaŭ leteron el Parizo, kun surskribo "tre urĝa", adresitan al Delegito U.E.A. kaj mi ne scias kion fari kun ĝi. Malfermi mi ĝin ne decidis, tial mi telefonis al vi kaj al s-ro Bemol por konsilo. Kion mi devus fari kun la letero, laŭ via opinio?

**Ranunkol:** Estas nepre bezone transdoni la leteron al s-ro Bemol. Li, kiel Subdelegito, certe rajtas malfermi la leteron kaj atenti ĝian enhavon.

**Heleno:** Jen, jen, mi pensis same. Mi vin tre dankas...

**Filipo:** (*ordigas la tukon, malfermas okaze la vizaĝon de la kadavro, vidas ke ĝi estas nigra, krias*) Oj - oj - helpu! Ĥolero, ĥolero! Helpu!...

**Ĉiuj:** (*konsternite*) Kio okazis? (*turniĝas al la negro, vidas la nigran vizaĝon*) Aj!

**Willy:** (*leviĝas kaj stariĝas sur la piedojn. Palpas sian bruston. Krias en negra lingvo ian sensencaĵon, poste*) Kie estas mia monujo? Kiu ŝtelis la monujon? (*atake venas kontraŭ Filipino, kiu sin premas al la angulo*) Diru! (*poste rigardas la aliajn; vidas sur la tablo sian leteron*) Jen estas mia letero! Kaj tiu sinjoro diris ke liĝin neniam ricevis. Kien mi trafis? Kie estas mia valizo? (*paŝas minace tra la ĉambro; ĉiuj sidas kaŭre, timigataj nenion komprenante. Filipino sur kvar piedoj ŝtele eliras tra la pordo*) Ĉu oni klarigos al mi, aŭ ne? Kiu vi estas, sinjoro? (*stariĝas apud Ranunkol*)

**Ranunkol:** M-mi estas la sekretario de la loka Esperanta Societo, s-ro Ranunkol.

**Willy:** Do, esperantisto! Kie estas mia monujo?

**Heleno:** (*trankviliĝante*) Jen estas via monujo. Kiu vi estas mem, sinjoro? Kiel vi trafis nian ĉambron, sur la kanapon, sur kiu antaŭ kelkaj momentoj kuŝis mia mortinta edzo?

**Willy:** Mortinta edzo? Mi nenion komprenas, gesinjoroj. Ĉu mi ne trafis okaze frenezulejon?

**Filipo:** (*venas rapide, tenas pafilon en la mano*) Ha, kanajlo! Cedu, vi estas kaptita. Nun mi vidos, kiu estas pli forta!

**Willy:** (*levas la manojn supren*) Sed mi nenion komprenas!

## Sceno 6-a

(*Venas Koaks. Ĉiuj denove kaŭras. Heleno staras senmove. Nur la negro venas al li renkonten*)

**Willy:** Diru, kara s-ro Koaks, kian komedion vi faris el mia ĉeesto en via hejmo. Se ĝi estas ŝercaĵo, volonte mi mem ridos pri ĝi, alie mi ne komprenas...

**Koaks:** Ho! Certe ĝi estas ŝercaĵo. Same kiel la vaŭdevilo kun mia ŝajna morto.

**Filipo:** (*akre krias kaj dance saltas*) Viva, viva, vivanta! (*ĉirkaŭprenas Agneson kaj dancas kun ŝi - ŝi lin vane repuŝas*)

**Heleno:** Aleksandro! Mi neniel imagus... (*falas sur lian bruston*)

**Willy:** Sed pardonu, karaj sinjoroj, mi nenion tamen komprenas? Kie estas la komenco kaj kie la fino de tiu ĉi komedio?

**Koaks:** Nun estas la fino. La komenco konsistas el tio, ke festenante hieraŭ mian dudekjaran esperantistan jubileon, mi permesis al mi tragluti iom pli da ĉampano ol mi povis. Miaj piedoj ne eltenis, mi falis sur la strato. Oni alportis min ĉi-tien, opiniante ke mi estas mortinta. Ĉu ne tiel, Filipino?

**Filipo:** Jes, jes, ĝuste tiel, sinjoro!

**Koaks:** Antaŭ via alveno mi divenis la sekreton kaj ĉar mi bezonis eliri el la akcidento senmakula, mi do uzis vin kiel anstataŭanton.

**Willy:** (*ridante*) Kiamaniere?

**Koaks:** Mi estis kuŝinta sur tiu ĉi kanapo, kovrita per la tuko. Kiam eniris vi, kiu ne konis la situacion, mi volis simple rompi la tutan komedion kaj klarigi al ĉiuj, ke mi estas viva. Sed ĉar vi estis ekdorminta sur mia kanapo, mi eksentis grandan tenton pli surprize

fini la komedion.

**Ĉiuj:** ha-ha-ha!

**Koaks:** Nu, sinjoroj, permesu prezenti al vi mian karan gaston, s-ro Hju-ám-ám, samideano el Liberio, vizitas nian urbon por tralegi lekcion pri sia bela naskolando.

**Ĉiuj:** Ha! tre interese. Kiel bele!

**Koaks:** Mi petas vin, karaj samhejmanoj ke vi pardonu al mi la nevolajn dolorojn kaj klopodojn, kiujn mi kaŭzis pro mia pseŭdo-morto.

**Filipo:** Nun ĉio estos denove kiel antaŭe.

**Koaks:** Ne, ne ĉio!

*(venas s-ro Bemol. Vidante s-ron Koaks vivanta, li tremas kaj retenigas ĉe la pordo)*

**Koaks:** Tre trafè! Bonan vesperon, s-ro Bemol! Bone, ke vi venis. Mi ĵus intencis paroli, ke post mia reviviĝo tuta mia vivo fluos kiel antaŭe. Nur... nur mi laboros plu sola, sen la Subdelegito.

**Bemol:** Kial?

**Koaks:** Ĉar, kiel mi vidas, sinjoroj Subdelegitoj tre ofte volas anstataŭi siajn Delegitojn eĉ en ilia familia vivo kaj ke por ili Esperanto ofte estas nur ŝirmilo.

**Bemol:** *(severe ekrigardinte Helenon)* Kiu al vi tion diris?

**Koaks:** Neniu. Mi mem aŭdis tion, kuŝante sub la tuko, kiam vi interparolis kun mia edzino.

**Bemol:** Do, vi min spionis.

**Koaks:** Ne nur. Mi ankaŭ vin instruis per la batoj sur vian dorson.

**Bemol:** *(forirante, indigne)* Komediantoj! Bone, mi priskribos ĉion okazintan por fari el tio komedion. Mi montros al vi! *(foriras minacante)*

**Koaks:** Ne forgesu enmeti en la komedion ankaŭ vin kiel agantan personon... Kaj la batojn!...

**Ĉiuj:** *(ridas)*

*(Kurteno)*